

10210

# Esperanto

*aktuell* 2013/3



**90a Germana Esperanto-Kongreso**

**Archiv und Bibliothek in Berlin**

**Printempa Semajno Internacia 2013**

**Esperantistoj en la Evangelia Eklezia Foiro**

**Bücherverbrennung vor 80 Jahren**

**Deutscher Esperanto-Bund e.V. (D.E.B.)  
Germana Esperanto-Asocio r.a. (GEA)**

Amtsgericht Berlin VR 13651 B  
[www.esperanto.de/deb](http://www.esperanto.de/deb)

**Oficejo, membropriorgado /  
Geschäftsstelle, Mitgliederbetreuung:**

**Deutscher Esperanto-Bund e.V.**  
Einbecker Str. 36, 10317 Berlin,  
030/69204846-0, faks. -9  
[gea.ma@esperanto.de](mailto:gea.ma@esperanto.de)

**Ĝenerala sekretario / Generalsekretär**  
Martin Schäffer, [deb@esperanto.de](mailto:deb@esperanto.de)

**Bankkonto** (por membrotizoj kaj donacoj)  
**/ Bankverbindung** (für Mitgliedsbeiträge  
und Spenden): Sozialbank Mainz, BLZ  
550 205 00, Konto 8603600. Spenden  
und Mitgliedsbeiträge für den D.E.B. sind  
steuerlich abzugsfähig.

**Estraro / Vorstand**  
Netzpost an / retmesaĝo al  
[gea.fe@esperanto.de](mailto:gea.fe@esperanto.de)

Die einzelnen Netzpostadressen haben  
die Form Vorname.Name@esperanto.de,  
soweit nicht anders angegeben.

**Prezidanto / Vorsitzender**

Sebastian Kirf, Dodo-Wildvang-Str. 4, 26723  
Emden, 07000/5473638, [retposhto@kirf.de](mailto:retposhto@kirf.de)

**Vicprezidanto / Stellv. Vorsitzender**

Andreas Emmerich, Hauptstr. 42, 64753  
Brombachtal, 06063/913714

**Trezoristo / Finanzverwalter**

Andreas Diemel, Bismarckstraße 168,  
47057 Duisburg, [gea.tr@esperanto.de](mailto:gea.tr@esperanto.de),  
0203/2964877, Büro: 0211/4566913, Mobil:  
0170/2809371, Fax: 03212/2631982

**Instruado / Lehrerarbeit**

Christof Krick, Günninghauser Str. 11a,  
59955 Winterberg, 02981/899557

**Eksteraj rilatoj, gazetara parolisto /  
Außenbeziehungen, Pressesprecher**

D-ro/Dr. Rainer Kurz, Plettenbergstr. 19,  
70186 Stuttgart, 0163/3873785

**Landaj ligoj / Landesverbände**

Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweg-Str. 11,  
53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler, 02641/4885

**Europa laboro / Europaarbeit**

Felix Zesch, Bornemannstr. 11, 13357 Berlin,  
tel. 0371/50349336

**Jugendvertreter / GEJ-komisiito**

Paul Mätzig, Körnerstr. 48,  
04107 Leipzig, 0341/2630607

**Germana Esperanto-Junularo /  
Deutsche Esperanto-Jugend**

Carl Bauer, Scheunenstraße 38, 17139  
Malchin, Tel. 01724826569

**Komisiitoj / Beauftragte**

[esperanto.de/deb/beauftragte.html](http://esperanto.de/deb/beauftragte.html)

**Gazetara laboro / Pressearbeit**

Thomas Sandner, Georg-Boehringer-Weg 17,  
73033 Göppingen, 07161/9869392, 0172/  
2658027, [Thomas.Sandner@esperanto.de](mailto:Thomas.Sandner@esperanto.de)  
Horst Vogt, Teurerweg 92, 74523 Schwäbisch  
Hall, [horst.vogt@esperanto.de](mailto:horst.vogt@esperanto.de)  
Hermann Kroppenber, Broicher Str. 37,  
51429 Bergisch Gladbach,  
[medienecho@esperanto.de](mailto:medienecho@esperanto.de)

**Libroservo / Bücherdienst**

D-ro / Dr. Wolfgang Schwanzer,  
Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz, (vespere/  
abends) 06136/46232, [Wolfgang.Schwanzer@esperanto.de](mailto:Wolfgang.Schwanzer@esperanto.de),  
[www.esperanto-buchversand.de](http://www.esperanto-buchversand.de)

**Printempa Semajno Internacia (PSI) /  
Internationale Frühlingswoche**

Wolfgang Bohr, (Adresse siehe unter / adreson  
vidu sub „Landaj Ligoj / Landesverbände“),  
[psi@esperanto.de](mailto:psi@esperanto.de), [www.esperanto.de/psi](http://www.esperanto.de/psi)

**Rondojaĝoj / Rundreisen**

Lars Sözüer, Realschulstr. 12, 47051 Duisburg,  
[lars.duisburg@gmx.de](mailto:lars.duisburg@gmx.de)

**Kontaktadreso / Kontaktadressen**

Julia Noe, Handschuhshheimer Landstr. 91,  
69121 Heidelberg, tel. 06221-3270724,  
[Julia.No@esperanto.de](mailto:Julia.No@esperanto.de)

**Pliaj adresoj / Weitere Adressen**

**Germana Esperanto-Junularo (GEJ) /**

**Deutsche Esperanto-Jugend (DEJ)**

Einbecker Straße 36, 10317 Berlin,  
[bero@esperanto.de](mailto:bero@esperanto.de), [www.esperanto.de/gej](http://www.esperanto.de/gej)

**Interkultura Centro Herzberg (ICH) /  
Bildungszentrum des D.E.B.**

Komisiitoj/Beauftragte: Zsófia Kóródy  
(instruado), Peter Zilvar (klerigado kaj  
kulturo), Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg,  
die Esperanto-Stadt, 05521/5983, Fax -/1363,  
[esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de), <http://esperanto-urbo.de>

**Germana Esperanto-Instituto /**

**Deutsches Esperanto-Institut**

Prof. D-ro/Dr. Martin Haase, Lehrstuhl für  
Romanische Sprachwissenschaft, 96045 Bam-  
berg, 0700/54648478, [Martin.Haase@uni-bamberg.de](mailto:Martin.Haase@uni-bamberg.de), [www.martinhaase.de](http://www.martinhaase.de)

**Germana Esperanto-Biblioteko /**

**Deutsche Esperanto-Bibliothek**

p/a. Karl Heinz Schaeffer, Schulstr. 17,  
73432 Aalen, [kh.schaeffer@t-online.de](mailto:kh.schaeffer@t-online.de)

**Fondaĵo FAME / FAME-Stiftung**

Andreas Emmerich, [estraro@fame-stiftung.de](mailto:estraro@fame-stiftung.de)  
(nur por FAME)

**Stiftung Mondo**

Hauptstr. 42, 64753 Brombachtal, 030/692048-  
460, [stiftungmondo@gmail.com](mailto:stiftungmondo@gmail.com),  
Bankkonto: 151100004, Volksbank Stuttgart  
eG, BLZ 600 901 00. Spenden sind steuerlich  
abzugsfähig.

**Aŭstria Esperanto-Federacio /  
Österreichischer  
Esperanto-Verband**

Postfach 39, 1014 Wien  
[aef@esperanto.at](mailto:aef@esperanto.at), [www.esperanto.at](http://www.esperanto.at)

**Aŭstria Esperanto-Junularo /  
Österreichische Esperanto-Jugend**

Weissgerberlande 30-36/5/11, 1030 Wien,  
[aefj@esperanto.at](mailto:aefj@esperanto.at), <http://aefj.esperanto.at>

**Esperantomuzeo Vieno /  
Esperantomuseum Wien**

Palais Mollard, Herrengasse 9, 1010 Wien,  
+43/1/53410-731, Postanschrift: Österreichische  
Nationalbibliothek, Josefsplatz 1, Postfach 308,  
1015 Wien, [plansprachen@onb.ac.at](mailto:plansprachen@onb.ac.at), [www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm](http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm)

**UEA-ĉefdelegitoj kaj perantoj /  
Bundesbeauftragte des Esperanto-  
Weltbundes UEA**

**Germanio / Deutschland**

D-ro / Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-  
Seeger-Str. 9, 55129 Mainz, (vespere / abends)  
+49/6136/46232, [Wolfgang.Schwanzer@esperanto.de](mailto:Wolfgang.Schwanzer@esperanto.de)

**Aŭstrio / Österreich**

Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400  
Klosterneuburg, tel., fakso +43/2243/22052,  
[aon.913548977@aon.at](mailto:aon.913548977@aon.at)

**Esperanto aktuell**

ISSN 0942-024 X

32. Jahrgang

**Eldonisto / Herausgeber**

Deutscher Esperanto-Bund e.V.,  
der Vorsitzende (v.i.S.d.P.)

**Redaktista teamo / Redaktion:**

Stano Marček (Martin/Slovakio),  
Yashovardhan, Kolpingstr. 44, 58706 Menden

**Kunlaborantoj / feste Beiträger:**

Uwe Stecher (Österreich, El la mondo),  
Hermann Kroppenber (Medienecho),  
Utho Maier (Bibliothek), Peter Zilvar (ICH)

**Presejo / Druck**

Alfaprint, Martin, Slovakio

*Esperanto aktuell* kun -kune- havas ses  
numerojn jare kaj estas abonebla ĉe KiDiS  
(vidu supre) por 18 € (de eksterlando: 24 €) jare.

*Esperanto aktuell* mit -kune- erscheint  
sechs Mal pro Jahr. Abonnierbar bei der  
Mitgliederbetreuung (s.o.). Abonnement: 18 €  
(Ausland: 24 €) jährlich; für ordentliche  
Mitglieder im Beitrag enthalten.

**Anoncoj / Anzeigen:**

Skribu al / Schreiben Sie an: [deb@esperanto.de](mailto:deb@esperanto.de)

**Kontribuoj / Beiträge**

Bv. sendi viajn kontribuojn (en formato \*.doc  
a.s.) al [ea@esperanto.de](mailto:ea@esperanto.de), por n-ro 2013/4 ĝis  
la 15a de julio 2013. Paperaj kontribuoj nur  
esceptkaze, tiam al Yashovardhan (vidu supre).  
Senden Sie Ihre Beiträge bitte (im Format  
\*.doc o.ä.) an [ea@esperanto.de](mailto:ea@esperanto.de), für Nr. 2013/4  
bis zum 15. Juli 2013. Papierbeiträge nur im  
Ausnahmefall, dann an Yashovardhan (s.o.)

## Liebe Leser,

als man mich fragte, ob ich mir vorstellen könnte, die Stelle des Vorsitzenden des Deutschen Esperanto-Bundes zu übernehmen, hatte ich tatsächlich zwei große Fragen:

1. Wie soll das gehen? Und 2. Wenn ja, wofür willst du dich einsetzen?

Auf diese beiden Fragen möchte ich an dieser Stelle gerne antworten, da ich diese für sehr wichtig halte. Ich bin mir sicher, dass es andere Personen geben mag, die vielleicht geeigneter für den Posten sein mögen als ich, ihn aber aus verschiedenen und sicher wichtigen Gründen abgelehnt haben. Ich werde auch nicht den Fehler machen, mich mit bisherigen Vorsitzenden zu vergleichen oder sie zu imitieren. Und ich bin mir der Verantwortung des Postens bewusst.

Die Situation ist nun aber mal so, wie ich sie eingangs schilderte, und das Ziel ist nun, das Beste daraus zu machen. Ich kann mich glücklich schätzen, dass wir einen gut funktionierenden, harmonischen Vorstand haben und dass es uns schon gelungen ist, wichtige Aufgaben auf mehrere Personen zu verteilen, so dass nicht alles zwangsläufig vom Vorsitzenden erledigt werden muss. Diese Arbeitsteilung gilt es natürlich beizubehalten und auch weiter auszubauen, so dass es überhaupt möglich ist, das Amt des Vorsitzenden auch dann zu bekleiden, wenn man beruflich bereits eingespannt ist.

Und das leitet mich schon gleich zur zweiten Frage über: Welche Dinge finde ich besonders verlockend? Hier scheint mir, dass es unumgänglich ist, die ursprünglichen, altbewährten und sicher auch guten Strukturen von Ortsgruppen, Landesverbänden und Bundesverband noch stärker mit den neuen Möglichkeiten durch die Vernetzung und Dezentralität zu kombinieren. Der Deutsche Esperanto-Bund hat nicht nur eine Funktion als „Dienstleister für Esperantosprecher in Deutschland“ (zum Beispiel, um Kongresse zu ermöglichen), sondern auch wichtige Ziele, für die er in der Öffentlichkeit stehen will. Hierzu muss er aber auch sichtbar sein und wahrgenommen werden. Mit der begonnenen Neugestaltung unseres Internetauftritts ist bereits ein wichtiger Schritt getan, auch erleichtert die neue Mitgliederverwaltung iDiS unsere Arbeit und interne Organisation wesentlich. Aber ich denke, dass wir da noch einiges an Potential haben, auch einzelne Personen mit ihren Fähigkeiten, Ressourcen und Interessen mehr in die Arbeit des Verbandes einzubeziehen.



Immer wieder sind mir in den vergangenen Jahren auch gute Ideen erzählt worden, was man machen könnte, sollte, müsste ... Zumeist scheitert es dann aber doch an einer genügend großen Zahl an Menschen, die das dann auch entsprechend umsetzen. Oder die Personen gibt es vielleicht zwar, aber sie wissen voneinander nicht oder haben nicht genügend Unterstützung oder Hilfsmittel, um ein Projekt umzusetzen. Ich denke, dies wird ein nächster Punkt sein, den ich gerne umsetzen würde: Möglichkeiten zu schaffen, über das Netz gemeinsam, aber zentral an einem Ort, zu arbeiten. Ideen auszutauschen. Projekte umzusetzen. Sichtbar(er) zu werden in der Öffentlichkeit und „unser“ Thema gut zu vertreten.

Mir ist bewusst, dass weder der Vorstand allein noch irgendeine Gruppe dies bewerkstelligen kann. Dies kann nur gemeinsam funktionieren. Hier gilt es, darüber zu diskutieren, einander zuzuhören und bereit zu sein, einen persönlichen Beitrag zu leisten. Nur durch Sichtbarkeit und Bewusstmachung der Wichtigkeit unseres Themas in der Öffentlichkeit werden wir meiner Meinung nach auch eine Chance haben, neue Mitglieder zu finden, die wir gut gebrauchen können: Denn Möglichkeiten, sich einzusetzen und aktiv zu werden für Esperanto, bieten sich jede Menge!

In diesem Sinne würde ich mich freuen, wenn Ihr / Sie meine Auffassung teilt, sie mit Euren / Ihren Ideen und Beiträgen unterstützen oder auch kritisch korrigieren mögt und es uns gelingt, den Deutschen Esperanto-Bund in den nächsten zwei Jahren weiter zu kräftigen!

**Sebastian Kirf**

Vorsitzender des Deutschen Esperanto-Bundes

## Enhavtabelo / Inhalt

**1** La nova GEA-prezidanto Sebastian Kirf transdonas al Gerald Tucker la dokumenton de honora membreco.

Foto: Hedwig Fischer

**2** Adresoj / Adressen

**3** Germana Esperanto-Asocio:

Karaj legantoj. Enhavtabelo / Inhalt

**4** Kongresoj kaj renkontiĝoj:

90a Germana Esperanto-Kongreso

**5** Arkivoj kaj bibliotekoj: Archiv und Bibliothek in Berlin: Der Vorsitzende besuchte das Bundesarchiv und die Staatsbibliothek

**6** Printempa Semajno Internacia 2013

**7** Esperanto-Ligo por Kristanoj en Germanio partoprenis en la Evangelia Eklezia Foiro

**8-9** Parolado okaze de la malfermo de la 90a Germana Esperanto-Kongreso

**10** Aŭstria Esperanto-Federacio:

LabourStart – agi por homaj kaj laboraj rajtoj

**11** Kial mi membras en UEA?

**12-13** El la mondo

**14** Kolloquium in Dresden: Über Stenografie und Plansprachen im Salon Talleyrand

**15** Krucvortnenigo

**16** Medienecho

**17** IBAN – die schreckliche: Einzug von Mitgliedsbeiträgen künftig problematisch

**18-21** Ĉefartikolo: Bücherverbrennung vor 80 Jahren

**22** El la fakaj ligoj: La bibliaj tagoj en Strasburgo

**23** Nia diskutejo: Puno kaj krueleco. Politisch verbogenes Deutsch

**24** Kalendaro

**25** Interkultura Centro Herzberg: Comenius-Projekt: Schülergruppe aus Herzberg in Italien

**26** 91a Germana Esperanto-Kongreso en Erfurt

**27-30** **kune** – revueto de Germana

**Esperanto-Junularo**: DEJ beim Evangelischen Kirchentag in Hamburg. Grüß Gott, liebe Leser. Aktive trafen sich in Hamburg. Raporto pri la Evangelia Eklezia Foiro en Hamburgo. Bullshit-Bingo. Solvo de la krucvortnenigo el la paĝo 15.

**31-32** Subteno necesas por la Esperanto-placo en Berlin.

# 90a Germana Esperanto-Kongreso

De la 17a ĝis la 20a de majo 2013 okazis la 90a Germana Esperanto-Kongreso en Nurenbergo. Samtempe la nurenberga Esperanto-grupo festis la 125an datrevenon de sia fondo.



Foto: Hedwig Fischer



**D**um la kongreso okazis la jarĉefkunveno de la Germana Esperanto-Asocio, kie la membrokunveno elektis la novan prezidanton Sebastian Kirf. La protokolon de la membrokunveno vi povos legi en la venonta numero de ĉi tiu

revuo. Mi petas la partoprenintojn skribi al ni ĉe la retadreso *ea@esperanto.de* pri viaj travivaĵoj dum la kongreso kaj pri la diversaj ekskursoj, kiujn vi partoprenis. Ankaŭ viaj memfaritaj bildoj estas bonvenaj. Elekton el tiuj ni povas aperigi en la venonta numero.

Sur la titolpaĝo vi vidas la novan prezidanton de GEA Sebastian Kirf, transdonantan ateston pri honora membreco al Gerald Tucker. Krome oni vidas sur tiu ĉi paĝo bildon de la akcepto en la urbodomo kaj de la nova estraro de GEA.

**Yashovardhan**



Esperanto-arbo en Nurenbergo

Foto: Bernhard Maurer

## Archiv und Bibliothek in Berlin

## Der Vorsitzende besuchte das Bundesarchiv und die Staatsbibliothek

(ruf) Wie bereits kurz gemeldet, sieht sich der bisherige Beauftragte für das Archiv des Deutschen Esperanto-Bundes (D.E.B.), Johann Pachter, nicht mehr in der Lage, das sehr umfangreiche Material privat zu lagern. Überraschend wurde daher das Berliner Büro (BerO) mit mehreren hundert Akten vollgestopft, so dass die Nutzungsmöglichkeit eingeschränkt ist. Auch sehr viele Bücher, zum Teil in der undichten Remise hinter dem Esperantohaus untergebracht, harren eines Verbleibs. Der Vorstand des D.E.B. war bereits vorher zu der Einsicht gelangt, dass Archiv und Büchervorrat auf lange Sicht kaum adäquat betreut werden können und deshalb besser in staatliche Obhut gegeben werden sollten. Ein Teil des Archivs wurde bereits im letzten Jahr der Bayerischen Staatsbibliothek übergeben. *Esperanto aktuell* berichtete bereits ausführlich in Nr. 2012/3, S. 24-26.

Ele tat Not. Am 19. April besuchte der Vorsitzende Rudolf Fischer sowohl das Bundesarchiv als auch die Staatsbibliothek zu Berlin – Preußischer Kulturbesitz. Es kam zu sehr ergiebigen Gesprächen mit den zuständigen Sachbearbeitern. Demzufolge hat der D.E.B.-Vorstand beschlossen, mit dem Bundesarchiv einen Schenkungsvertrag über das gesamte Archivmaterial abzuschließen, mit Ausnahme bayerischer Unterlagen. Die Unterzeichnung des Vertrages steht noch aus. Der größte Teil der Akten ist praktisch übergabefertig von Johann Pachter zusammengestellt und muss nur oberflächlich aufbereitet werden. Dafür wurde der Vertrag mit Sibylle Bauer, schon bislang als Helferin im BerO tätig, aufgestockt.

Etwas unsicherer ist die Situation bei den Büchern. Die Staatsbibliothek würde zumindest den Teil übernehmen, der ihr fehlt. Dafür muss Frau Bauer zuerst ein Verzeichnis erstellen, durch das vielleicht auch die Deutsche Esperanto-Bibliothek in Aalen noch gesuchte Stücke erhalten kann. Bei seinem Besuch machte der Vorsitzende noch deutlich, dass sich im Netzauftritt der Staatsbibliothek ein paar seltsame Behauptungen über „Kunstsprachen“ finden: zum einen gebe es so gut wie keine Originalliteratur: Fischer verwies auf Geoffrey Suttons mehrere hundert Seiten starke Bibliographie zu Original-Esperantowerken hin. Zum anderen seien Übersetzungen nicht erwünscht. Der Vorsitzende konnte die kompetente Sachbearbeiterin, immerhin selbst Slawistin, davon überzeugen, dass

gerade bei einer „Plansprache“ Übersetzungen quasi ein Protokoll der historischen Sprachentwicklung sind. So kann man hoffen, dass die beanstandeten Behauptungen korrigiert werden.

Insgesamt haben damit Archiv und Bibliothek eine neue Perspektive, zumal das Material dann auch über den öffentlich zugänglichen Index der staatlichen Institutionen für Forschungszwecke auffindbar wird.

## Germana Esperanto-Asocio ricevis danke jenajn revuojn:



*Bulgara Esperantisto* (2013/1,2), *Dia Regno* (2013/1,2), *L' esperanto* (2012/6, 2013/1), *Esperanto en Danio* (2013/1,2), *La Espero* (2013/1,2), *Espero Katolika* (2013/1-3), *FEN-X* (2013/1,2,3), *IPR* (2013/1), *La Informilo* (161, 2013 mar), *Kataluna Esperantisto* (2012 dec), *Kontakto* (2012/5,6;2013/1), *La Lanterno Azia* (2013/1,2,3,4), *le monde de l'Esperanto* (583, feb), *Norvega Esperantisto* (2013/1,2), *Nova Irlanda Esperantisto* (2013/115,116), *Novajoj Tamtamas* (279,280,281), *revuo Esperanto* (2013/2,3,4,5), *La Ondo de Esperanto* (2013/2,3,4+5), *Revuo Orienta* (2012/12, 2013/2,3), *Sennaciulo* (2012 /11+12), *Starto* (2013/1), *SES informas* (2013/2), *Usona Esperantisto* (2013/1).

# Printempa Semajno Internacia 2013

Multege da neĝo atendis la alvenintojn dum la tiu-ĉi-jara Printempa Semajno Internacia (PSI), kiu okazis en la germana urbeto St. Andreasberg de la 25a de marto ĝis la 1a de aprilo.

**K**vankam ĉeestis pro diversaj kialoj ne tiom multaj personoj kiel en pasintaj jaroj, estis internacia etoso, al kiu kontribuis partoprenintoj el pluraj eŭropaj landoj kaj Kanado.

Rilate al la temo „akvo“ okazis pluraj prelegoj kaj ekskursoj. En la regiono Harz-montaro viziteblas Monda Kulturheredaĵo de UNESKO: unika sistemo de lagetoj, akvobaraĵoj kaj malgrandaj kanaloj, per kiuj oni kondukis akvon al multaj akvoradoj produktante energion por la ercminejoj.

Sed akvo, en diversaj formoj, ankaŭ bone taŭgis por amuziĝi en granda naĝejo, en glitŝu-kurejo kaj dum skiado aŭ sledado. Tiuj, kiuj preferis endoman sportadon, povis partopreni tablo-tenisan konkurson, gimnastikon aŭ Zumba-dancadon.

Junaj infanoj precipe ŝatis la MAZI-kurson kaj la vesperajn „piĝamajn rakontojn“, dum kiuj ili aŭskultis kaj rigardis fabelajn librojn. Pro la



Foto de Rob Keetlaer

paskofesto ili ricevis dolĉaĵojn de la paska leporo.

Por pli aĝaj partoprenantoj okazis koncertoj de Manuel kaj EspoDespo, krome teknike tre altkvalite farita kvizo „Ĝepardi“ (de la angla Jeopardy), en kiu la kandidatoj gajnis poentojn doninte ĝustajn demandojn! Junuloj kaj maljunuloj gaje dancis dum la „akvo-balo“. Kiu poste ne dormemis, spektis filmojn en la nokta kinejo.

La venonta PSI okazos de la 14a ĝis la 21a aprilo 2014 en la okcidenta urbo Xanten.

**Petra R. Dückerhoff**



Dancantoj dum la akvobalo

Foto de Dieter Frense

## Esperanto-Ligo por Kristanoj en Germanio partoprenis en la Evangelia Eklezia Foiro

„Esperanto? - Ĉu ĝi ankoraŭ ekzistas?“ Per tiaj demandoj ofte grizharuloj alproksimiĝis al nia stando en la „Foiro de la Eblecoj“ kadre de la 34a Evangelia Eklezia Foiro, kiu okazis de la 1a ĝis la 5a de majo en Hamburgo.

**K**aj ili plejofte daŭrigis rakontante, ke ili en junaĝo almenaŭ multon aŭdis pri Esperanto aŭ eĉ eklernis la lingvon. Sed bedaŭrinde...

La junaj homoj, kiuj vizitis nian standon, kutime starigis lingvajn demandojn. Malmultaj volis diskuti kun ni, kial oni lernu entute Esperanton.

Preskaŭ ĉiujn interesis la Biblio en Esperanto, impresis ilin ankaŭ nia ekumena kant- kaj preĝlibro Adoru. La plej ŝatata teksto ĉe nia stando certe estis la „Patro nia“. Ĝin ni oftege laŭtlegis, samtempe klarigante



bazajn regulojn de nia lingvo. Ĉar ni sciis, ke en alia halo troviĝis stando de Germana Esperanto-Junularo, kie oni ofertis mallongajn enkondukajn kursojn, ni sendis la junajn scivolemulojn al ili.

Resume mi ŝatus diri, ke regis gaja etoso, alparolis nin homoj afable, kelkaj eĉ laŭdis nin pro nia engaĝiĝo, kaj ni sukcese plenumis nian taskon.

La Esperanto-Ligo por Kristanoj en Germanio, landa sekcio de KELI (= Kristana Esperantista Ligo Internacia), klopodas ja pri du kampoj: unuflanke ĝi reprezentas kaj konfesas Kristanan kredon inter la Esperantistoj, aliflanke ĝi varbas por Esperanto inter la Kristanoj.

Uzante Esperanton i.a. dum fakkunsidoj, diskutoj kaj diservoj la membroj plenumas la taskon, konatigi la internacian lingvon al la ceteraj Kristanoj. Kiel unu el la plej favoraj medioj por la tia varbado montriĝas la Evangelia Eklezia Foiro. Jam dum multaj jaroj la Germana KELI-sekcio regule partoprenas, ankaŭ do en Hamburgo.

Nia ĉijara stando troviĝis en la temaro „spiritualeco“, kodvorto „ekumeno vivanta“.

Mi ŝuldas grandan dankon al ses Hamburgaj Esperantistoj kaj al Japano, kiuj fidele helpis ĉe la stando, eĉ transprenis pli da laboro, kiam du anoncitaj homoj malsanis.



Goro Kimura kun junaj klientoj

Hedwig Fischer

# Parolado okaze de la malfermo de la 90a Germana Esperanto-Kongreso

## Estimataj gesinjoroj, karaj Esperanto-amikoj,

90a Germana Esperanto-Kongreso, tio estas ia jubileo, kiu estu kaŭzo, momenton paŭzi kaj pripensi, kie la Germana Esperanto-movado staras kaj kiuj estu niaj vojoj kaj metodoj dum la venonta tempo. La vorto „kongreso“ provokas la ideon de faka laboro, dum certe multaj el vi venis tien ĉi por renkonti viajn Esperanto-konatojn kaj ĝui la belan urbon Nürnberg. Tio ĉiam jam estis tiel kaj ankaŭ ne kritikenda. Aliflanke la ĉi-jara programo ŝajnas al mi enhavi malpli da fakaj kunsidoj kaj temoj ol kutime, ĉu hazardo aŭ ĉu indiko de nova evoluo?

Nia komuna celo estas, disvastigi Esperanton per informado, instruado kaj perado de uz-ebloj. Por tio Germana Esperanto-Asocio havas la tradician strukturon: la federacia estraro, la landaj ligoj kaj la lokaj grupoj. Nekontesteble nia membraro ŝrumpis seninterrompe dum la lastaj 20 jaroj, multaj lokaj grupoj estas disfalantaj aŭ jam malaperis. El inter la landaj ligoj, kiuj entute ne nur ekzistas sur la papero, nur malmultaj sisteme laboras, laste Bavara Esperanto-Ligo eĉ malfondiĝis. Oni aŭdas voĉojn, kiuj diras, ke niaj tradiciaj strukturoj estas ne plu tempokonformaj, kaj ke estonte Esperanto nur ekzistos en la Interreto.

Ni premisu, ke tia argumentado ne nur estas preteksto, kaŝi la propran inertecon. Ni plie de-iru de la konstato, ke ankaŭ nuntempe Esperanto estas lingvo, kiu entuziasmigas siajn parolantojn, ne nur kiel funkcia lingvo, sed ĉefe kiel komunikilo inter amikoj mondveste. Tiam ni povas pripensi, kio estas ŝanĝenda, por adapti niajn strukturojn kaj labormetodojn al la moderna tempo por disvastigi Esperanton.

Mi konstatas en tiutemaj diskutoj du gravajn erarojn. La unua estas, ke la estonto nur apartenas al la Interreto, kial oni povas do cedi ĉiun aktivadon al la junularo. Sed tiu fakte preskaŭ dronas en la ĉiutaga maro de bagatelaj babiladoj kaj pseŭdo-informoj. Malgraŭ Skajpo aŭ poŝtelefono-ludilo tiuj,



kiuj bezonas verajn personajn rilatojn, bezonas ankaŭ personajn renkontojn. Lernado kaj aplikado de Esperanto en rondo de fizike ĉeestanta amikaro restas nerezignebla. Bonŝance estas ĝojinda fenomeno, ke ekde pluraj jaroj ankaŭ iamaj funkciuloj de Germana Esperanto-Junularo komprenas tion kaj senprobleme plulaboras en Germana Esperanto-Asocio. Tiurilate mi mem povas trankvile retiriĝi el la GEA-estraro, restas por mi sufiĉa laboro subteni nian aferon.

La dua eraro estas, ke oni deklaras niajn nunajn strukturojn (federacia estraro, landaj ligoj, lokaj grupoj) superflujaj. Mi absolute kontraŭas tion. Jes ja niaj strukturoj estas adaptendaj al la moderna tempo, sed tion ni jam faris dum la lastaj jaroj: Ni havas tre fleksiĝeman sistemon de membreco, kiu ebligas al ĉiu bonvolulo, kunlabori por la disvastigo de Esperanto, ĝis neniom paganta interesato aŭ simpatianto. Ni havas centran datumbankon, kiu estas alirebla de aktivuloj sur ĉiu nivelo de niaj strukturoj, kaj kiu estas valora instrumento por ĉiuspecaj aktivadoj. Ni havas nian retpaĝaron, varbas por niaj aranĝoj en la Interreto, estas videblaj kaj renkonteblaj en laŭeble multaj retforumoj.

Sed por kelkaj kritikantoj tiu adaptado ne sufiĉas. Ili postulas, forigi la tutan organizitan Esperantomovadon, de UEA ĝis la lokaj grupoj. Tiaj postuloj ignoras plurajn faktojn:

Unue membroj de Germana Esperanto-Asocio ebligas ĉiujare, financi centrajn taskojn. Mi nur memorigu pri informado en foiroj, la financado de nia kleriga centro en Herzberg kaj Esperanto-kursoj ĝenerale, la financaj garantioj por diversspecaj



aranĝoj, plie ankaŭ la subvencio de Germana Esperanto-Biblioteko, la foja lanĉado de libro kiel „Die Zamenhofstraße“, la kunlaboro en Eŭropaj projektoj kiel Grundtvig, la investo por konvena sorto de nia arkivo, ktp. ktp.

Due, la socia vivo en Germanujo havas la strukturon de sistemo de societoj. Se iu grupo ne estas laŭjure fondita, tiam ĝi estas ignorata kaj malagnoskata, ĝi foje eĉ ne ricevas la rajton starigi informstandon. Tial ankaŭ ŝajne privataj entreprenoj kiel tiutempe la Esperanto-Centro Paderborn aŭ nuntempe EsperantoLand kompreneble estis resp. estas registritaj asocioj.

La historio montras, ke iniciatoj, kiuj dependas de unu aŭ nur kelkaj personoj, post komenca sukceso fine iam ekklamas kaj malaperas, dum la organizita Esperanto-movado restas kaj donas perspektivon. Tial mi ne komprenas tiujn, kiuj ŝaŭmas kontraŭ UEA kaj GEA, ne pretaj, mem transpreni postenon kaj respondecon, sed nur kun la celo, disbati la organizon.

Laŭ kontribuo de naiva nemembro en *Esperanto aktuell* sufiĉas spontanaj rondoj, kiuj kolektas spontane monon. Sed la referenco al sukcesaj entreprenoj kiel E&I kaj lernu.net misgvidas, ĉar ĝuste tiuj vivas de centra monfonto (la fondaĵo ESF), kiu pagas la salajron de la profesiaj organizantoj, kaj ne de spontanaj monkolektoj por iuj, kiuj hazarde emas fari ion.

Sekve jes necesas en Germanujo centra organizo kiel GEA, kiu spronas al aktivado en la tuta lando. Sed la GEA-estraranoj solaj povas ja nur stimuli kaj ne mem fari ĉiun laboron. (Tio validas malgraŭ tio, ke la plej multaj nunaj GEA-estraranoj samtempe havas postenojn sur federaci-landa kaj loka kaj faka niveloj, do konas la laboron el propraj spertoj kaj sekve ne postulas ion de aliaj, kion ili ne mem konas, pretas, kapablas ...)

Tial estas klare, ke devas ekzisti regionaj organizoj, en Germanujo prave orientataj laŭ la limoj de la federaciaj landoj, kiuj siavice stimulas agadojn sur regiona nivelo. Se iuj ne scias, kion ili faru, mi volonte donos al ili longan liston de taskoj tipaj por landa ligo.

Restas la lokaj grupoj. Ilia funkcio kompreneble ŝanĝiĝis, ĉar oni ne plu bezonas ilin por ekzerci Esperanton. Por tio servas la aranĝoj, al kiuj la

homoj (normalkaze) povas iri. Malgrandkvante ankaŭ retaj servoj kiel Skajpo ebligas paroladon de hejme.

Ĉiam jam loka grupo vivis de unu-du aktivuloj, kaj kiam tiuj maljuniĝis aŭ ekklamis, la tuta grupo disfalis, dum aliloke aperis nova aktivulo, kiu fondis tie grupon ktp. Nuntempe ni bezonas vastan reton de lokaj aktivuloj, ĉar neniŭ kurso, neniŭ informstando, neniŭ aranĝo povas funkcii sen subteno de loka aktivulo (esceptoj pravigas la regulon).

Ekzemple Germana Esperanto-Kongreso ne povas vere esti organizata de ekstere, sen helpo de loka aktivulo. Kaj tiu devas havi lokajn helpantojn, kiu dum la kongreso helpas. La sama validas por aliaj aranĝoj. Kune entrepreni ion (kaj ne nur kafoklaĉi), plifortigas la senton de komuneco, kiu ankaŭ nuntempe por multaj homoj ankoraŭ estas alloga.

Aranĝoj estas la kerno de nia aktivado, ĉar nur tie homoj vere kunvenas por paroli Esperanton kaj plifirmigi la personajn interrilatojn. Mi daŭre respertas tion en semajnfinaj kursoj, kulturaj tagoj, komunaj agadoj, ktp. De tiaj aranĝoj la homoj revenas hejmen entuziasmaj kaj konvinkitaj, ke Esperanto estas bona afero por ili.

Mi resumu: organizoj, inter ili landaj ligoj kaj reto de lokaj aktivuloj (kun lokaj helpantoj) estas nerezigneblaj ankaŭ en nia tempo, kaj la progreson donas la aranĝoj. Tial mi alvokas vin, uzi tiun ĉi kongreson por subteni la disvastigon de Esperanto, por ĝui la avantaĝojn, kiujn donas nia komuna lingvo, por serioze labori kaj informiĝi, sed ankaŭ nelaste por festi kaj turismumi.

Jen mi deklaras la 90an Germanan Esperanto-Kongreson malfermita.

**Rudolf Fischer**




# LabourStart – agi por homaj kaj laboraj rajtoj

Eric Lee naskiĝis je 1955 en Usono kaj laboras kiel sindikato, aŭtoro kaj retej-kreanto. Interalie li estas la fondinta editanto de *LabourStart*, interreta novaĵ-servo por la sindikata movado. Eric Lee ankaŭ verkis la libron *The Labour Movement and the Internet: The New Internationalism* (La internacia laborista movado kaj la Interreto: La nova internaciismo; Pluto Press, 1996).

## LabourStart kaj Esperanto

La novaĵoj de LabourStart estas dissendataj per la propra retejo kaj per novaĵservo, en kiu membras pli ol 730 sindikatoj. Februare 2013 la paĝaro havis 638.000 unuopajn vizitojn. Kunlaboras pli ol 900 volontuloj por informi. Helpe de traduk-grupo ĉe Google (ligilo troveblas en [www.labourstart.org/eo](http://www.labourstart.org/eo)) - en kiu ĉiu interesato povas kunlabori - la Esperanto-versio estas denove aktuala; Esperanto aperas samrange en la



reteja menuo de LabourStart. Tiel ekzistas la ebleco, ke Esperanto rolas kiel grava pontlingvo por tradukoj diverslingvaj kaj estas vaste „videbla“.

Ni ĝojas, ke Eric Lee pretis, doni al ni intervjuon pri sia laboro kaj opinioj pri Esperanto.

### Kio estas LabourStart?

LabourStart estas retejo por novaĵoj kaj kampanjoj de la internacia sindikata movado. Mi fondis ĝin en 1998. Ĝi nur disponeblas en la Interreto: [www.labourstart.org](http://www.labourstart.org).

### Kio estas la kampanjoj?

Sindikatoj el diversaj landoj ofte bezonas internacian subtenon – ekzemple por konvinki registaron liberigi enkarcerigitajn sindikatistojn. Kutime ili pludonas tiujn alvokojn al sia tutmonda sindikata federacio kaj tiu ĉi kontaktas LabourStart por lanĉi la kampanjon.

### Ĉu Vi povas doni ekzemplon por aktuala kampanjo?

Certe. Antaŭ kelkaj semajnoj la Turkia polico faris razion en la centra oficejo de KESK, la sindikato de la publika servo. Proksimume 160 arestordonoj estis anoncitaj. La internacia sindikata movado kaj Amnesty

## LabourStart

Kie sindikatoj komencas sian tagon sur la reto.

International taksas tion atako kontraŭ la sindikato kaj refutas la registaran akuzon, ke la sindikato estas iel ligita kun terorismo. Koalicio de tutmondaj kaj Eŭropaj sindikatfederacioj kune kun la Internacia Sindikata Unio, kiu reprezentas 175 milionojn da laborprenantoj en 156 landoj, petis LabourStart, lanĉi retkampanjon, kiu ene de mallonga tempo atingis pli ol 8.000 subtenantojn.

(Rimarko de la red.: Pli poste, meze de aprilo, LabourStart informis, ke pli ol 11.000 protest-mesaĝoj estas senditaj kaj ke 72 membroj de tiu ĉi Turkia sindikato estas liberigitaj, sed la ŝtataj riproĉoj ankoraŭ validas. Do la agado de LabourStart daŭradas.)

### Kaj ĉu la kampanjoj efikas?

Jes - kelkfoje. Ni sukcesis, ke sindikatoj venkis strikojn, aktivuloj estis liberigitaj el malliberejo, kaj ni konvinkis registarojn kaj laboradantojn agadi responskonscie. Ne ĉiam ni sukcesas, sed sufiĉe ofte por eldoni libron pri tiu afero. „Campaigning online and winning“ (Interrete kampanji kaj venki) ni publikigis komence de 2013 en la Franca kaj la Angla.

### Kial Esperanto?

Mi kredas, ke Esperanto povas esti nekredeble utila por la sindikata movado, precipe en la internacia laboro. Nia kampanjaro estas multlingva, ofte la kampanjoj estas en 20 diversaj lingvoj. Mi scias, ke Esperanto (ankoraŭ) ne estas la lingvo de milionoj da homoj, sed gravas montri al

sindikatoj ke Esperanto estas vivanta lingvo kaj ke ĝi povas esti utila por superponti lingvajn barilojn.

### **Kion sindikatoj pensas kaj scias pri Esperanto?**

Tre malmulte. Tiuj, kiuj iam aŭdis pri ĝi, opinias, ke neniu parolas ĝin. Ili estas tre frapitaj pro la uzado de Esperanto ĉe LabourStart.

### **Kaj kiu estus la avantaĝo de Esperanto-uzo por sindikato?**

Estas facile lerni Esperanton, kaj pro tio aktivuloj povus komuniki per ĝi pli bone – Interrete, telekomunike kaj vid-al-vid.

### **Ekzistas tradicio de Esperanto-uzo ĉe sindikatoj, ĉu ne?**

Jes, certe ekzistas. Sed tiu tradicio estas komplete forgesita ĉe la pinto de la sindikata movado, kaj hodiaŭ ni devas starti je la komenco.

### **LabourStart ne nur lanĉas kampanjojn sed ankaŭ liveras novaĵojn. Kiamaniere Esperanto konvenas al tiu agado?**

LabourStart publikigas novaĵojn per proks. 30 lingvoj. Tiuj diverslingvaj sciigoj ne estas simplaj tradukaĵoj, sed memstaraj sciigoj. La korespondanto trovas labor-novaĵon en la Interreto kaj sendas retligilon al ĝi. Rilate al Esperanto la situacio estas tute alia: unue ni bezonas tradukaĵojn kaj ties Interretan publikigon kaj nur poste sekvas ligilo al la artikolo, kiu estu enmetita en LabourStart.

### **Kiel mi povas helpi?**

Dumaniere vi povas helpi: per tradukoj de kampanjoj, kiuj estas lanĉitaj du- aŭ trifoje monate, kaj per tradukado de novaĵoj.

Ĉiukaze ... membriĝu en nia traduk-grupo ĉe Google <https://groups.google.com/forum/?fromgroups#!forum/labourstart-tradukgrupo>

### **Kaj finfine, kio estas Via persona rilato al Esperanto?**

Mi aĉetis mian unuan Esperanto-libron proksimume antaŭ kvardek jaroj, sed mi ne lernis la lingvon ĝis mi trovis ekzempleron de Teach Yourself Esperanto en Londona libro-vendejo antaŭ dek jaroj. Sekve mi membriĝis en la Brita Esperanto-Unio kaj en UEA. Aktuale mi instruas mian partneron kaj revivigas mian scion pri la lingvo. Mi konvinkis mian partneron per tiuj ĉi tri punktoj:

Unue, Esperanto estas fantasta atingo de homa kreivo: la atingo de Zamenhof kaj de ĉiuj, kiuj sekvas lin kaj realigis lian revon. Due, Esperanto reprezentas belan vizion pri mondo, en kiu homoj povas interkomuniki kaj kompreni unu la alian, mondo de paco kaj egaleco. Kaj fine, Esperanto estas nekredible bela lingvo per sia ekstrema simpleco. Ekzemple la Zamenhofs traduko de la Hebrea Biblio sukcesas montri la belecon de la originala teksto inter ĉiuj tradukoj plej bone.

### **Koregan dankon pro la intervjuo kaj ni deziras al Vi sukceson en Via laboro.**

(Uwe Stecher)

## **Kial mi membras en UEA?**

**Universala Esperanto-Asocio – la plej granda kaj plej internacia organizo por Esperanto – bezonas membrojn por plenumi siajn taskojn je monda nivelo. Ĉi tie ni volas prezenti la opinion de unuopaj membroj, ĉi-foje Roy McCoy, Nederlando, kaj Slavik Ivanov, Rusio.**

### **Roy McCoy:**

Post vojaĝo al Japanio kaj Ĉinio en la fruaj okdekaj jaroj, dum kiu mi konstatis la bezonon por pli facila internacia lingvo ol la angla por azianoj, mi renkontis Esperanton kaj ĝian movadon, aliĝis al UEA, kaj post nelonge iĝis eĉ dumviva membro de tiu asocio. Kial? Ĉar mi firme kredis, ke internacia lingvo estas parto de la estonteco de la homaro, kaj mi volis esti parto de tiu estonteco. Estis honoro kaj privilegio por mi poste esti invitita labori en la Centra Oficejo de UEA. Dum miaj 25 jaroj tie miaj kredoj pri multaj aferoj



estas ŝanĝiĝintaj, tamen ne mia baza kredo pri la idealo de Zamenhof kaj ĝia realigo en lia lingvo. Vivu Esperanto, kaj vivu UEA.

### **Slavik Ivanov:**

Mi tuj volis membri en Esperanto-organizo, kiam mi certiĝis pri la justeco de la proponata solvo por la monda lingva problemo. Mi volis aliĝi por publike montri mian subtenon de la ideo mem. Mi ne scias multajn aliajn kialojn por aliĝi krom eble la senteblaj rabatoj por partopreni UK kaj IJKon.



## Ses TEJO-premiitoj iros al Internacia Junulara Kongreso

En januaro TEJO, la Esperantista junulara organizo, anoncis kampanjon por ebligi al aktivuloj el la gastiga lando de la pasintjara IJK, partopreni la ĉi-jaran kongreson. TEJO sukcesis kolekti pli ol 3400 eŭrojn, kio permesas al tri homoj la vojaĝon el Vjetnamio kaj la partoprenon. Elektitaj estis Phuong (Flama) – prezidantino de LKK, Thu (Helenjo) – LKK-anino, kaj Hoàn (Ĝojo) – helpantino en 97-a UK kaj 68-a IJK. Plej malavaraĵoj kontribuis venis el Nederlando (1080 eŭroj), Francio (730 eŭroj), Brazilo (460 eŭroj) kaj Germanio (400 eŭroj). La fondaĵo Esperanto Internacia helpis al la kampanjo, per kromaj 200 eŭroj.

(<http://tejo.org/eo/node/1486>)

## Du esperantistoj ordenitaj

En marto 2013 la vojevodo de Grandpolio Piotr Florek dekoris du estraranojn de la Federacio Eŭropo-Demokratio-Esperanto, Eŭgeno Macko kaj Stanisław Rynduch, per la Kavalira Kruco de la Ordeno de Merito por la Respubliko Pollando. Tiu ĉi ordeno rekonas kontribuojn al firmigo de internacia kunlaboro kaj al progresigo de la interrilatoj de Pollando kun aliaj landoj kaj popoloj. Pli da detaloj legeblas en La Balta Ondo:

<http://sezonoj.ru/2013/03/ede-pl/>

## La 100-a Universala Kongreso okazos en Francio

La nordfranca urbo Lillo (Lille) gastigos la 100-an Universalan Kongreson de Esperanto en la jaro 2015. Inviton pri la okazigo de la UK faris Unuiĝo Franca por Esperanto. Lillo estas la ĉefurbo de la regiono, en kiu situas ankaŭ Bulonjo-ĉe-Mar. La urbo de la unua UK ne havas la necesajn kondiĉojn por konsiderinde pli granda aranĝo ol tiu en 1905. Tamen dum la 100-a UK okazos tuttaga ekskurso al la proksima Bulonjo-ĉe-Mar. UK de Esperanto estas unu el

